" Tamen ne ĝenu vin, mi petas " Alicio rapide respondis "donante plilongan klarigon; mi timas ke vi tro lacigus vin per tia laboro."

" Ho, ne parolu pri la laboro, mi petas" diris la Dukino " mi ja oferas al vi donace ĉion, kion mi diris ĝis nun."

"Jen donaco efektive nulkosta!" pensis Alicio. "Mi tute ne ŝatus, ke la naskotagaj donacoj estu tiaspecaj." Sed tion ŝi ne kuraĝis diri laŭte.

"Ĉu ree vi pensas?" diris la Dukino, kaj Alicio denove sentis sur la ŝultro speciale fortan ekpremon de la dukina mentono.

"Mi ja rajtas pensi" iom akre respondis Alicio, ĉar ŝi komencis senti sin ĝenata.

" Vi rajtas certe" konsentis la Dukino, " sed ne pli ol porkoj rajtas flugi; kaj la M——"

Sed en tiu momento Alicio forte surpriziĝis, ĉar eĉ en la komenco de tiu tre ŝatata vorto, la dukina voĉo ekvelkis, kaj la dukina brako, ligita kun la ŝia, forte tremis. Jen, rekte kontraŭ ili, vizaĝo kontraŭ vizaĝo, staris la Kera Damo, kun la brakoj falditaj. Ŝi sulkigas fulmotondre la brovojn.

" Estas bela tago, via Dama Moŝtino" la Dukino komencis per tre humila kaj malforta voĉo.

" Jam nun mi admonas vin" la Damo pasie interrompis ŝin, piedfrapante la grundon " aŭ vi aŭ via kapo jam nun devas esti for, vi elektu!"

La Dukino elektis, kaj —— malaperis!

"Ni daŭrigu la ludadon" la Damo diris al Alicio; kaj Alicio, tro timigite por eligi eĉ unu vorton, per malvolantaj paŝoj sekvis ŝin al la ludejo. La aliaj gastoj, profitante la foreston de la Damo jam sidiĝis sub la arboj por ripozi. Sed ekvidinte la Damon, ili tuj levis sin kaj enue ekludis. Por instigi ilin la Damo anoncis ke eĉ unumomenta prokrasto kostos al la prokrastanto—la vivon. Dum la tuta ludtempo, tra la tuta ludkampo, la Damo ne ĉesis malpaci kun la aliaj ludantoj kaj ĉiu-momente kriegis "Senkapigu lin" aŭ "Senkapigu ŝin." La soldatoj devis gardi la ĉiu-minute mortkondamnatojn; por plenumi tiun devon, estis necese ke ili forlasu la luddevon, t.e. la devon esti arkoj; kaj konsekvence restis post duonhoro eĉ ne unu arko; ĉiuj parto-prenintoj (krom la Reĝo, la Damo, kaj Alicio) estis jam mortkondamnitaj kaj soldate gardataj.



La Damo — pro manko da senkapigebla materialo—ĉesis labori, kaj per spireganta voĉo demandis al Alicio:

"Ĉu vi jam vidis la Falsan Kelonion?"

" Ne" respondis ŝi " eĉ mi ne scias kio estas Falsa Kelonio."